FN PER ANC 47


# Normanda Esperanto Bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL. TRIMONATA BULTENO. Nº 2

--- Januaro 1968 ---

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Redaktas: S-ino J.VINCENT. Rue des Oiseaux - 27 - LES ANDELYS

Sendu la materialon por la bulteno antaŭ la 15-a de marto, 15-a de junio, 15-a de septembro kaj 15-a de decembro.


++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

ENHAVO:


Paĝoj: 1: Bileto de la prezidanto
2&3 : Vivo de la grupoj
3&4 : Filatela angulo
4 : Ĝenerala kunveno de la Normanda Federacio
5 : Unua rezulto de la nacia enketo
Kotiztabelo


========================================================================

## AL IU NEKONATA ESPERANTISTO NOVBAKITA...

De pluraj jaroj jam, ni kutimas, okaze de regionaj kongresoj, inviti eksterlandanojn, same kiel faras kelkaj grupoj, okaze de kunvenoj. Tio estas sekvenda ekzemplo.

Efektive, Zamenhof kreis Esperanton, ne por enlanda uzado, sed li volis krei ilon ebligantan interkomprenon inter homoj, kiuj, ĉe ĉiu flanko de linio nomata landlimo, parolas malsaman lingvon.

Kompreneble, ĉiu Esperanto-grupestro zorgas pri la tre ofta uzado de nia lingvo dum la kunvenoj de la grupo. Li pravas, ĉar, krom la ellernado de Esperanto, ĝia praktika uzo necesas.

Sed la novbakita esperantisto ekkonscios la - en li ĝis nun nesuspekteblan - valoron kaj efikon de l' internacia lingvo, kiam okazos lia unua renkontiĝo kun eksterlandano. Li estos kortuŝita kaj, verŝajne, miros tiel facile kompreni. Kaj, ne pripensante, ankaŭ li parolos... Li parolos multe pli facile ol kiam li parolas kun siaj samgrupanoj. Kompreneble, li sentos dekoblan emocion se li partoprenos internacian kongreson. Li ankaŭ rimarkos, ke ne nur li sed same la aliaj eraras!

Iam, stranga okazo trafis la knabon, kiu mi tiam estis: nur de kelkaj semajnoj, mi estis lernanta naĝadon. La tajdo estis alta kaj la nivelo de la maro situis je du aŭ tri metroj sub la enakvigilo; tiam, du junuloj puŝis min en la akvon. Mi ne havis piedtenon! Mi iom timis, sed de tiu tago, mi sciis, ke mi povos naĝi, ne pensante tuŝi teron per la piedoj!

Nu, nekonata esperantisto novbakita, jen la konsilo, kiun mi donas al vi:"Ĵetu vin en la akvon!"Vi certe ne dronos kaj vi ekscios, ke naĝi (ne, mi eraras!) ke paroli Esperanton kun eksterlandano estas tre facila.

Deziras al vi ĉiuj, karaj normandaj gesamideanoj,

" Feliĉan Novjaron"

la Prezidanto de U.N.E.

Maurice HUET.

## VIVO DE LA GRUPOJ.

**CLEON.** S-ro Chamaret daŭrigas la instruadon de Esperanto en la aŭtomobil-fabrikejo, kvankam la intereso ŝajne malkreskas.

**LE HAVRE.** Denove funkcias kursoj en nia urbo: 1-a grada por infanoj, gvidata de S-ino Colleu; 1-a grada por plenkreskuloj, gvidata de S-ino Gontard; 2-a grada por plenkreskuloj, gvidata de S-ro Huet.
Same kiel pasintjare, specialaj konversaciaj kunvenetoj okazas du fojojn monate, gvidataj, laŭvice, de diversaj samideanoj.
En novembro, G-roj Hess, el Buenos-Ayres, reveninte el la U.K. tra diversaj landoj, alvenis en nian havenon por enŝipiĝi. Tie ,ili restadis dek ses tagojn, ĉar ilia ŝipo bezonis riparadon kaj malfruis.
S-ino Lavallée, tre afable, disponigis dormĉambron al niaj argentinaj geamikoj, en sia ĉarma kaj kvieta domo. Pluraj samideanoj promenigis ilin tra la urbo kaj la regiono.
La grupo kunvenis por aŭdi S-ron Hess paroli pri ĉiuj landoj en Sud-Ameriko. Li prezentis belajn diapozitivojn. Estis tre interesa vespero. Dum nia konversacia kunveneto, G-roj Hess, spertaj esperantistoj, konsilis nin, kaj kiel ĉefludantoj plaĉis al ĉiuj. La Havra grupo esperas, ke niaj geamikoj konservos bonan memoron pri sia restado inter ni.

S-ino Y. Lucas.

**LES ANDELYS.** Okaze de la Zamenhof tago okazis la 16-an de decembro tre interesa vespero. Unue, S-ro Rousseau el Paris parolis pri Esperanto kaj filatelo. Due, S-ino Haudebine komentariis belajn lumbildojn pri Hindujo, kie ŝi instruis Esperanton jam ok jarojn.
Dimanĉon, la 17-an, gaja tagmanĝo, dum kiu oni aŭdis nur Esperanton, okazis en agrabla restoracio.

**LISIEUX.** Somere, grupeto da Lekzoviaj samideanoj efektivigis kuniĝon, jam de longe antaŭplanitan, en Saint-Aubin-sur-Algot, kies komunumestro estas nia invitito, S-ro Rault.
La gaja ĉeestantaro tagmanĝis en la konsilantara salono, verve ŝercante kaj babilante. Sekvis promenado, pli verdire duobla promenado: tra la kamparo, tra la pasinteco kaj eĉ ĝis la prahistorio, ĉar la regiono estas riĉa je postsignoj de la plej antikvaj enloĝintoj.
Nia gastiganto-gvidisto, kleregа amanto de sia "Pays d' Auge", scipovas varme konigi ĝiajn ĉiuspecajn allogitaĵojn; tial, ĉu piedirante sur kavaj vojetoj (bonega okazo riĉigi nian vorttrezoron per nomo de kreskaĵoj), ĉu aŭtomobile veturante, ni laŭvice vizitis:
La preĝejon kaj tombejon de St Aubin sur Algot, kie oni elfosis frankajn ŝtonĉerkojn, bronzajn zon buketojn, ponardegojn t.n. "Scramasaxes". Tie ankoraŭ maljuniĝas multcentjara taksuso, samtempulo de la XII-a jarcenta preĝejo;
La preĝejon "N.D. de Livaye", kies trabaro senpere apogiĝas sur la tero, kaj kiu entenas antikvajn admitindajn statuojn, interalie tre maloftan "Krucumito en Gloro" kaj Di-patrinon, kortuŝantan pro nobla sinteno kaj spirita beleco.
Poste, ni gapis al la grimacantaj subkornicaĵoj superantaj la murojn de la Monteilla preĝejo. La kastelo de Grandchamp kaptis nian atenton: inteligente restaŭrigita, ĝi kunigas XVI- kaj XVII-an jarcentajn konstruaĵojn en okulfrapa kunmetaĵo. La urbeto St Julien le Faucon

nin akceptis por la horkvina teo.

Alpreninte la gvidadon, S-ro Leconte, nia freŝdata delegito, rekondukis nin al Lisieux, laŭ pentrinda kaj fantaziplena "vojeto de la lernantoj."

C. MARTIN.

YVETOT. Malfermiĝis la 12-an de oktobro du kursoj en la duagrada lernejo:1) elementa kurso kun 4 lernantoj
2) supera kurso kun 2 lernantoj.

Pli malfrue, post informado en la gazetoj kaj disdono de 1100 prospektoj, malfermiĝis la 28-an de novembro publika kurso. Sep personoj ĉeestis la unuan lecionon. Laŭ peto de unu el ili, la lecionoj nun okazas ĉiun merkredon je la 20 h 30;

Intertempe okazis, la 14-an de novembro, ĝenerala kunveno de la Kultura Centro de Esperanto por adopti novan statuton kaj decidi la laborprogramon dum la venonta jaro. Oni reelektis la estraron: Prezidanto: S-ro Albert His; Sekretariino: S-ino Pottier; Kasisto: Pastro Cherfils. S-ro Pottier okupiĝas pri la kursoj.

P. POTTIER.

&°&°&

## FILATELA ANGULO.

HUNGARUJO: a) en la kadro de la Asocio de Hungaraj filatelistoj, kreiĝis filatela Esperanto-Asocio. Adreso: Asocio de Hungaraj Filatelistoj Esperanto-Sekcio P.O.B. 164 Budapest VI Hungarujo

b) la Hungara filatela revuo "Filateliai Szemle" publikigis la jenajn informojn: Februaro 1967. La Esperanto-Sekcio petas siajn membrojn partopreni en filatela ekspozicio. Ili devas indiki siajn proponojn. Tiu filatela Esperanto-Sekcio kunvenas la unuan lundon de ĉiu monato je la 18 h en la domo Eszperanto Szövetség Budapest VIII Kenyérmező u. 6 Hungarujo. Tiu sekcio deziras verki filatelan Esperanto vortaron.

Normanda Esperanto Bulteno

dhi, R.Tagore. Hispanujo: Alfonso XIII, Torres Quevedo. Hungarujo: Endre Ady, Haman Katarina, Georgon Kilian. Jugoslavio: J.B.Tito. Monako: J. Verne. Rumanujo: E. Ady. Sovetunio: G. Dimitrov, F.E.S. Dsershinski, M. Kalinin, Kolas Jakub, Janka Kupala, W.I.Lenin, J.V.Mitschurin, W.A.O-brutscher, A.S.Popov, Tolstoî, K.E.Ciolkovskij. Svedujo: H.Becquerel, W. Ramsey. Usono: Clara Barton. Vatikano: Pius X, Pius XI, Pius XII.

Se iu konas aliajn esperantistojn aŭ apogintojn de Esperanto sur poŝtmarkoj, bonvolu indiki ilin por kompletigi la liston.

G. CHAMARET.

+o+o+o+

GENERALA KUNVENO DE LA NORMANDA FEDERACIO.

11-an de februaro 1968, je la 14-a, en LISIEUX."Maison des Jeunes et de la Culture."

Al tiu kunveno estas invititaj ĉiuj U.F.E.membroj loĝantaj en Normandio.

-:-:-:-:-:-

TAGORDO:

- finpreparo kaj akcepto de la statutoj
- elekto de la komitato kaj de la estraro
- estonta agado

------------

La ĉi suba voĉdonilo estas sendenda antaŭ la 8-a de februaro 1968 al S-ro P.Pottier 50, résidence Fief de Caux 76- YVETOT, en fermita koverto afrankita je 0, 30 F, kun indiko "Voĉdonilo Normanda Federacio." Ne forgesu indiki sur la koverto viajn nomon kaj adreson.
N.B. Tiu koverto estos malfermita nur la 11-an de februaro.

---

## NACIA ENKETO.

Esperantistoj ĉiam devas esti pretaj respondi ĉiujn demandojn pri la movado ĝenerale; pro tio necesas, ke ili estu plene informitaj.

Ni supozu, ke subite nia ministro pri Nacia Edukado decidas enkonduki Esperanto-instruadon en la lernejojn kaj informiĝas pri la disponebla profesoraro. Ĉu vi kapablos respondi precize?

Jen kial ni lanĉas hodiaŭ la jenan tre gravan enketon al kiu, ni petas, ĉiu el vi bonvolu respondi klare kaj detale.

---

Nomo:

Antaŭnomo:

Naskiĝdato:

Profesio:

Adreso:

Kiujn Esperanto-diplomojn vi posedas?

Titoloj de la diplomoj: . Datoj:

.

.

.

.

Ĉu vi jam instruis Esperanton?

Al kiuj (infanoj, gejunuloj, plenkreskuloj)?

Ĉu vi eventuale akceptus gvidi kurson en lernejo?

Rimarkoj:

Dato kaj subskribo:

Bonvolu eltondi aŭ kopii tiun demandaron kaj sendi ĝin kiel eble plej fru
al S-ino J. Vincent Rue des Oiseaux 27- Les Andelys.

Polycopié par J. V. 27- Les Andelys. La gérante: Mme J. Vincent.